
# MAŬ ZEDONG

· SERVU AL LA POPOLO

· MEMORE AL NORMAN BETHUNE

· MONTOTRANSLOKIGO FARE DE MALSAĜA AVO

(西外2)



武元真藏书

# MAŬ ZEDONG

## SERVU AL LA POPOLO

---

## MEMORE AL NORMAN BETHUNE

---

## MONTOTRANSLOKIGO FARE DE MALSAĜA AVO

FREMDLINGVA ELDONEJO
PEKINO 1968

*RIMARKO DE LA ELDONINTO*

En tiu ĉi broŝuro la artikolo *Memore al Norman Bethune* estas tradukita laŭ la ĉina originalo en la dua volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, publikigita de la Popola Eldonejo, Pekino, en aŭgusto 1952; kaj la artikoloj *Servu al la Popolo* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* estas tradukitaj laŭ la ĉinaj originaloj en la tria volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, publikigita de la sama eldonejo en majo 1953.

*Presita en Ĉina Popola Respubliko*

## SERVU AL LA POPOLO

(8 septembro 1944)

Nia Komunista Partio kaj la de ĝi gvidataj Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj estas revoluciaj trupoj, kiuj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo. Kamarado Ĝang Side estis unu el la batalantoj de tiuj trupoj.

Ĉiuj homoj mortas, sed ne ĉiu morto havas saman signifon. La antikva ĉina literaturisto Sima Kian diris: "Ĉiu mortas, sed la morto de iu estas pli peza ol la monto Tajŝan, dum la morto de alia pli malpeza ol lanugero." La morto por la interesoj de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan; la morto de tiu, kiu laboras por faŝismo kaj oferas sian vivon por ekspluatantoj kaj subpremantoj de la popolo, estas pli malpeza ol lanugero. Kamarado Ĝang Side mortis por la interesoj de la popolo, kaj lia morto estas pli peza ol Tajŝan.

Ĉar ni servas al la popolo, sekve se ni havas mankojn, ni ne timas, ke aliaj ilin montras kaj kritikas. Ĉiu ajn povas montri al ni niajn mankojn, kaj ni estas pretaj korekti ilin, se nur li kritikas prave. Kaj ni tuj akceptas proponon de iu ajn, se nur la propono estas utila al la popolo. La propono pri "bonkvalitigo de la armeo kaj simpligo de la administrado" estis elmetita de sinjoro Li Dingming, kiu ne estas ano de nia partio. Lia propono estas bona kaj estas utila al la popolo, do ni akceptis ĝin. Se nur ni persistas en ĉio bona kaj korektas ĉion malbonan por la interesoj de la popolo, niaj trupoj sendube prosperos.

Ni venis el plej diversaj anguloj de nia lando kaj kolektiĝis kunen por komuna revolucia celo. Kaj kune kun la plejparto de la ĉina popolo, ni iros la vojon al tiu revolucia celo. Hodiaŭ, ni jam gvidas bazlokojn kun 91 milionoj da loĝantoj, sed tio ne sufiĉas, ni devas ankoraŭ plivastigi ilin, por ke ni povu gajni la liberiĝon de la tuta nacio. En tempo de malfacileco, ni devas vidi niajn atingaĵojn, devas vidi la lumon kaj devas levi nian kuraĝon. Nun la ĉina popolo troviĝas en suferado, ni havas devon savi ĝin kaj lukti per nia tuta forto. Kie estas lukto,



tie estas vivofero, kaj mortoj de homoj okazas konstante. Sed, pensante pri la interesoj de la popolo kaj pri la suferoj de la plejparto de la popolo, ni trovas, ke ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo. Tamen, ni devas kiel eble plej multe redukti nenecesajn vivoferojn. Niaj kadroj devas zorgi pri ĉiu batalanto kaj ĉiuj en la revoluciaj vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian.

Estonte kiam iu ajn el niaj vicoj mortos — tute egale ĉu tiu estas kuiristo aŭ batalanto, se nur li faris ian utilan laboron, ni honoros lian enterigon per ĉeesto kaj okazigos funebran kunvenon. Tio fariĝu regulo. Tion ni devas rekomendi ankaŭ al la popolanoj. Se iu en vilaĝo mortos, oni okazigu funebran kunvenon. Per tio ni esprimu nian kondolencon kaj unuigu la tutan popolon.

## MEMORE AL NORMAN BETHUNE

(21 decembro 1939)

Kamarado Norman Bethune estis membro de la Komunista Partio de Kanado. Kiel sendito de la Komunistaj Partioj de Kanado kaj Usono, li ne trovis la vojaĝon longa por veni al Ĉinio fore de miloj da mejloj en la aĝo de pli ol 50 jaroj, kun la celo helpi Ĉinion en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito. Li atingis Jan-an en la printempo de la lasta jaro, poste laboris en la montaro Vutaj kaj tie bedaŭrinde oferis la vivon sur sia posteno. Estante fremdulo, li rigardis kiel sian propran la liberigan aferon de la ĉina popolo, sen ajna egoisma motivo. Kia spirito tio estas? Tio estas la spirito de internaciismo, la spirito de komunismo. Ĉiu membro de la Komunista Partio de Ĉinio devas lerni de li tiun spiriton. Laŭ leninismo la proletaro de kapitalismaj landoj devas subteni la liberigajn batalojn de la koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj kaj la proletaro de



la lastaj devas subteni la liberigajn batalojn de la proletaro de la antaŭaj, kaj nur tiel la mondrevolucio povos venki. Kamarado Bethune praktikis tiun leninisman linion. Ankaŭ ni ĉinaj kompartianoj devas praktiki tiun linion. Ni devas unuiĝi kun la proletaro de ĉiuj kapitalismaj landoj, kun tiu de Japanio, Britio, Usono, Germanio, Italio kaj ĉiuj aliaj kapitalismaj landoj, kaj nur tiel ni povas faligi imperiismon, liberigi nian nacion kaj nian popolon kaj liberigi la naciojn kaj popolojn de la tuta mondo. Tio estas nia internaciismo, la internaciismo per kiu ni oponas kontraŭ malvasta naciismo kaj malvasta patriotismo.

La spirito de kamarado Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondecema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo. Ĉiu kompartiano devas lerni de li. Estas nemalmultaj homoj, kiuj ne konscias sian devon al la laboro, preferante la malpezan kaj evitante la malfacilan, ŝarĝante aliajn per pezaj taskoj kaj elektante por si la facilajn. Antaŭ ĉiu afero, ili unue kalkulas por si mem kaj poste por la aliaj. Farinte ion, ili eksentas ke ili havas grandan meriton, kaj ŝatas sinlaŭdi, timante ke aliaj ne scias. Kaj al kamaradoj kaj la popolo,

anstataŭ esti plenkore varmaj, ili estas malvarmakoraj, indiferentaj kaj sensentaj. Tiaj homoj en efektiveco ne estas komunistoj aŭ almenaŭ ne estas kalkuleblaj kiel puraj komunistoj. Neniu el tiuj kiuj revenis de la fronto, ne montris sian admiron kaj ne estis tuŝita de la spirito de Bethune, parolante pri li. La armeanoj kaj popolanoj de la Limregiono de Ŝanhi, Ĉahar kaj Hebej, kiuj persone estis kuracitaj de doktoro Bethune aŭ propraokule vidis lian laboron, ĉiuj estis kortuŝitaj. Ĉiu kompartiano nepre devas lerni de kamarado Bethune tian spiriton de vera komunisto.

Kamarado Bethune estis kuracisto, kuracado estis lia profesio, kaj li strebadis ĉiam al pli alta nivelo en sia kuracarto. En la tuta medicina fako de la Oka-voja Armeo, lia kuracarto estis elstara. Tio estas ankaŭ ekstreme bona instruo al tiuj, kiuj emas ŝanĝi sian laboron vidante ion malsaman; kaj al tiuj, kiuj malestimas teknikajn laborojn, konsiderante ke tiuj estas sensignifaj kaj ne donas bonan perspektivon.

Mi renkontiĝis kun kamarado Bethune nur unu fojon. Poste li skribis al mi multajn leterojn, sed pro okupateco mi skribis al li nur unu respondleteron kaj eĉ ne scias, ĉu li ricevis ĝin. Lia forpaso estas por mi tre dolora. Nun ni ĉiuj rememoras lin; tio montras, kiel profunde lia spirito tuŝis nian koron. Ni ĉiuj devas lerni lian spiriton de absoluta senegoismo. Kun tiu spirito oni povos fari sin homo ege utila al la popolo. Homo povas havi grandan aŭ malgrandan kapablon, sed sole kun tiu spirito, li jam estas homo nobla, pura, bonvirta, libera de trivialaj interesoj kaj utila al la popolo.

## MONTOTRANSLOKIGO FARE DE MALSAĜA AVO

(11 junio 1945)

Ni havis tre sukcesan kongreson. Ni faris tri aferojn. Unue, ni decidis la linion de la Partio, nome kuraĝe mobilizi la amasojn kaj pligrandigi la popolajn fortojn, por ke ili venku la japanajn agresantojn, liberigu la tutlandan popolon kaj starigu nov-demokratian Ĉinion sub la gvido de nia partio. Due, ni akceptis la novan statuton de la Partio. Trie, ni elektis la gvidan organon de la Partio — la Centran Komitaton. De nun nia tasko estas gvidi la tutan membraron efektivigi la linion de la Partio. Nia kongreso estas kongreso de venko, kongreso de unuiĝo. La delegitoj donis bonegajn opiniojn pri la tri raportoj. Multaj kamaradoj faris memkritikon kaj, celante al unuiĝo, ĝin atingis per memkritiko. Tiu ĉi kongreso estas modelo de unuiĝo, de memkritiko kaj de enpartia demokratio.



Post la fermo de la kongreso, multaj kamaradoj reiros al siaj laborpostenoj kaj dise al diversaj batalkampoj. Kamaradoj, kiam vi alvenos al diversaj lokoj, vi propagandu la linion de la kongreso kaj, pere de la membroj de la tuta Partio, klarigu ĝin al la vastaj popolamasoj.

La celo de nia propagando pri la linio de la kongreso estas tio, ke la tuta Partio kaj la tuta popolo starigu fidon pri la nepra triumfo de la revolucio. Unue, ni devas plialtigi la politikan konscion de la avangardo, por ke ĝi faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas. Ni devas veki ankaŭ la politikan konscion de la vastaj popolamasoj de la tuta lando, por ke ili volonte kaj ĝoje batalu kune kun ni por akiri venkon. Ni havigu al la tuta popolo la jenan fidon: Ĉinio apartenas al la ĉina popolo, sed ne al la reakciuloj. Estas antikva ĉina fablo nomata "Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo". Ĝi rakontas pri maljunulo, kiu loĝis en norda Ĉinio antaŭ tre tre longa tempo kaj estis konata kiel Malsaĝa Avo de la Norda Monto. Sude antaŭ lia domo staris du grandaj montoj Tajhang kaj Vangvu, kiuj baris al li la vojon. Li decidis kaj gvidis siajn filojn forigi tiujn ĉi

montojn per ŝpatoj. Alia maljunulo konata kiel Grandaĝulo Saĝa vidis ilin kaj ridis, dirante: "Kiom malsaĝaj vi estas! Estas tute neeble por vi kelkaj homoj fose forigi tiajn du grandajn montojn." Malsaĝa Avo respondis: "Kiam mi mortos, miaj filoj daŭrigos la laboron; kiam ili mortos, estos miaj nepoj, kaj poste iliaj filoj kaj nepoj, kaj tiel plu senfine. Kvankam la du montoj estas tre altaj, tamen ili ne povos kreski kaj, kun defosado de ĉiu peco, ili fariĝos pli malaltaj. Kial do ni ne povos ilin ebenigi?" Refutinte la eraran opinion de Grandaĝulo Saĝa, li daŭrigis la fosadon ĉiun tagon sen iometa ŝanceliĝo. Tio kortuŝis Dion kaj li sendis teren du anĝelojn, kiuj surdorse forportis la montojn. Nuntempe, troviĝas ankaŭ du grandaj montoj peze kuŝantaj sur la dorso de la ĉina popolo. Unu estas imperiismo kaj la alia feŭdismo. La Komunista Partio de Ĉinio jam antaŭ longe decidis forigi ilin. Ni devas nepre persisti kaj labori senĉese, kaj ankaŭ ni kortuŝos Dion. Nia Dio estas neniu alia ol la popolamasoj de la tuta Ĉinio. Se ili leviĝos kaj fosos kune kun ni, kial ni ne povos ebenigi la du montojn?

Hieraŭ, du usonanoj estis reirontaj al sia lando kaj mi diris al ili, ke la usona registaro volas subfosi nin kaj tio ne estas permesita. Ni oponas la politikon de la usona registaro subteni Ĉiang Kajŝek kontraŭ la komunistoj. Tamen ni diferencigas, unue, la usonan popolon de ĝia registaro kaj, due, interne de la usona registaro la politikdecidantojn de la subaj ordinaraj funkciuloj. Mi diris al la du usonanoj: "Diru al la politikdecidantoj en via registaro, ke ni malpermesas al vi usonanoj eniri en la liberigitajn regionojn, ĉar via politiko estas subteni Ĉiang Kajŝek kontraŭ la komunistoj kaj ni devas esti singardemaj. Vi povas veni al la liberigitaj regionoj, se via celo estas batali kontraŭ Japanio, sed ni unue faru kontrakton. Ni ne permesas al vi ŝtele iri ĉien. Ĉar Patrick J. Hurley jam publike deklaris sin kontraŭ kunlaboro kun la Komunista Partio de Ĉinio, do kial vi ankoraŭ volas veni kaj vagi ĉien en niaj liberigitaj regionoj?"

La politiko de la usona registaro subteni Ĉiang Kajŝek kontraŭ la komunistoj montras la furiozecon de la usonaj reakciuloj. Sed ĉiuj provoj de la reakciuloj ĉinaj kaj fremdaj por malebligi al la ĉina popolo gajni venkon estas destinitaj al malsukceso. Demokratio estas la ĉefa fluo en la mondo hodiaŭ, dum la kontraŭdemokratia reakcio estas nur kontraŭfluo. Nuntempe, la reakcia

kontraŭfluo penas superregi la ĉefan fluon de nacia sendependiĝo kaj popola demokratio, sed ĝi neniam povos fariĝi la ĉefa fluo. Hodiaŭ ankoraŭ sin trovas en la malnova mondo tri grandaj kontraŭdiroj, kiel Stalin montris antaŭ longe: unue, la kontraŭdiro inter la proletaro kaj la burĝaro en la imperiismaj landoj; due, la kontraŭdiro inter la diversaj imperiismaj potencoj, kaj trie, la kontraŭdiro inter la koloniaj kaj duonkoloniaj landoj kaj la imperiismaj metropolaj landoj. Ne sole ankoraŭ ekzistas tiuj ĉi tri kontraŭdiroj, sed ili fariĝas eĉ pli akraj kaj pli disvastigitaj. Pro la ekzisto kaj kresko de tiuj kontraŭdiroj, kvankam sin trovas nun reakcia kontraŭfluo kontraŭ Sovetio, komunismo kaj demokratio, tamen ĝi fine estos venkita iam estonte.

Ĉimomente estas okazigataj du kongresoj en Ĉinio, nome la Sesa Tutlanda Kongreso de Kuomintango kaj la Sepa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio. Ili havas tute malsamajn celojn: la celo de unu estas ekstermi la Komunistan Partion kaj ĉiujn aliajn demokratiajn fortojn en Ĉinio kaj tiel treni Ĉinion en mallumon; la celo de la alia estas faligi la japanan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn, la ĉinajn feŭdajn fortojn, kaj konstrui nov-demokratian Ĉinion, kaj tiel konduki



Ĉinion al lumo. Tiuj ĉi du linioj batalas unu kontraŭ la alia. Ni firme kredas, ke gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kaj direktata de la linio de ĝia Sepa Kongreso, la ĉina popolo akiros plenan venkon, dum la kontraŭrevolucia linio de Kuomintango neeviteble malvenkos.

毛 泽 东
为人民服务
紀念白求恩
愚 公 移 山

外文出版社出版（北京）
1968年袖珍本第一版
編号：（世）1050—602
00009
1—Es—732Pc